

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 318 (84) KVINA EPOKO

SEPTEMBRO-OKTOBRO 2001





ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL  
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio  
per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo  
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj  
Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj *Esperanto*, Kontakto kaj libroj), FEL  
(revuo *Monato* kaj libroj), IKEL, *Literatura Foiro*, *Heroldo*, *La  
Kancerkliniko*, *La Ondo de Esperanto*, *Litova Stelo*, *Scienca  
Revuo* (ni peras ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental)  
Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: 93-716 36 33, (ekde  
lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)

Ret - adreso: [kea@stel.net](mailto:kea@stel.net)

Ret - paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

Kotizoj por la jaro 2001: Individua Abonanta Membro 3.500  
p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua  
Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj;  
Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència  
461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Neus Moly;  
vicprezidanto: Josep Franquesa; kasisto kaj provizora  
sekretario: Llibert Puig; komitatanoj: Mercè Porta, Roger  
Prieto, Anna Casasús.

Kontrola Komisiono: Miquel A. Altuna, Arnald Massanas,  
Lluís Armadans.

Kataluna Esperantisto: Llibert Puig, Marina Ollé.  
Revizianto: Hèctor Alòs i Font.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre  
esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj  
ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080  
Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91  
Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

## REVUOJN NI PEROS POR VI

Jen kelkaj rekomendindaj revuoj kun  
la abonkoto por 2002. Nia asocio  
tamen povas peri por vi abonojn al  
aliaj revuoj. Nepre informiĝu ĉe ni.

### ESPERANTO

Estu informata pri la plej gravaj aferoj lingvaj, eldonaj,  
movadaj pere de la oficiala organo de UEA. Revuo tre  
allege aranĝita kun 11 numeroj jare, kun multaj fotoj por  
ke vi konu aŭ rekonu niajn aktivulojn. ĉ.22 paĝoj, malpli ol  
A-4 formata.

Revuo sen membreco .....32 eŭroj  
Revuo kun Jarlibro kaj membreco ..... 50 "  
Membreco kun Gvidilo (sen revuo nek Jarlibro) . 8 "

### KONTAKTO

La revuo de TEJO. "La plej vaste junulara gazeto  
rekomendinda por komencantoj, diversa kaj amuza"  
Alloga por montri ĉar bone presita sur altkvalita papero.  
Dumonata ĉ.16-paĝa, prok.A-4.....19 eŭroj

### MONATO

Por scii pli funde pri aktualaj temoj nemovadaj: politiko,  
ekonomio, arto, spirita vivo, muziko, recenzoj. Monata  
25/30 paĝa je grandeco A-4, presita sur reuzita papero  
(imitinde!) kun multaj fotoj kaj tabeloj, vere  
montrinda.....32 eŭroj

### LA ONDO DE ESPERANTO

La internacia revuo kiu venas el Rusio kun tre diversa kaj  
interesa enhavo. Monata 20-paĝa A-4 kun literatura  
suplemento jarfine.....24 eŭroj

### LITERATURA FOIRO

Ne nur per ĉiutagaĵoj la menso viglas. Poezio, recenzoj,  
lingvaj artikoloj, rakontoj, ornamentaj per belaj desegnaĵoj.  
Ne rezignu tian plezuron. Dumonata, 56-paĝa A-5  
.....25'25 eŭroj

### HEROLDO

Primovada, sendependa gazeto de la E-mondo. Krom  
novaĵojn vi trovos ankaŭ recenzojn kaj prilingvajn  
artikolojn. Abunde ilustrita. Trisemajna. 4-paĝa  
DIN-A3.....29 eŭroj

### INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Por instruistoj kaj instruemuloj scivolaj pri la agado de  
ILEI aŭ pri pedagogiaj novaĵoj ne nur en la instrua kampo  
sed en la kunviva. Trimonata, ĉ.36-paĝa A-5 formata  
.....14'5 eŭroj.

### LITOVA STELO

Ekkonu la movadon en fora Litovio kaj ĝuu ankaŭ  
originalajn rakontojn kaj poemojn. Kleriĝu per gramatikaj  
artikoloj kaj interesaj biografioj. Ilustrita. Dumonata, 33-  
paĝa en formato 24 x 16'5 ..... 12 eŭroj

### LA KANCERKLINIKO

.Por malfermi ĉiajn mensajn okulojn, por ne ĉion kredi  
legu ĝin: skandalema, ajnista, lingve kaj enhave  
malpruda kun kelkaj luksaĵoj (ravaj poemoj, oftaj komiksoj  
(bildstrioj) de Arnau, surprizigaj desegnaĵoj. Trimonata  
malpli ol 30-paĝa, prok.A-4  
.....19'5 eŭroj

### JUNA AMIKO

Por junaj homoj ĉiuaĝaj. Jen alloga, amuza, riĉenhava  
revuo de ILEI kun notoj por komencantoj. Moroj, kvizoj,  
enigmoj, kantoj, pedagogiaj konsiloj, biografiaj notoj,  
konkursoj Trimonata ĉ.27-paĝa A-5 ..... 11 eŭroj



## RAPORTO PRI OMAĜO AL SALVADOR GUMÀ

Nia asocio kun la kunlaboro de Kultura Asocio Esperantista kaj Hispana E-Fervojista Asocio omaĝis sian dojenon Salvador Gumà dimanĉon la 30an de septembro 2001 en la urbo Reus, lia loĝloko, okaze de lia centjariĝo en tiu sama dato.

La festo okazinta en salono de la prestiĝa loka asocio Centre de Lectura estis triparta. La tuton prezentis nia loka aktivulino Luz Vázquez. Pli ol cent ĉeestantoj plejparte esperantistaj donis brilan etoson al la festo.

Unualoke, nome de la katalunaj esperantistoj, la prezidantino de KEA, Neus Moly, liveris al li belan art-objekton kun aluda teksto (vidu kovrilan foton). Joan Marimon kiel editoro prezentis la libron *Kiam floras la timianoj* verkitan de nia omaĝito kaj eldonitan de KEA tiuokaze. La unua parto finiĝis per prelego de s-ino Birthe Lapenna el Danio kun traduko al la kataluna de Abel Montagut por la neesperantista publiko (la prelego estas havebla surpapere laŭ peto al nia oficejo). La prelegantino donacis al la omaĝito la belan ĵus aperintan verkon *Eseoj memore al Ivo Lapenna*.

Dualoke sekvis la institucia omaĝo kun interveno de la loka urbestro Lluís Miquel Pérez, kiu liveris belan platon kun memoriga teksto (vidu suban foton), kaj interveno de Vicenç Lloret, skabeno de la vilaĝo Alcover, kie la omaĝito naskiĝis en la jaro 1901. Finis tiun parton reprezentantino de la kataluna registaro s-ino Carme Borbonés, kiu donacis al s-ro Gumà memorigan medalon.

Kaj kronis la solenaĵon la emocia interveno de Marta, nepino de la omaĝito, kiu rememoris kortuŝajn travivaĵojn kun la afabla avo.

La omaĝito je la fino emocie dankis la ricevitajn ĝentilaĵojn.

Nia muzikteamo Kaj Tiel Plu beligis la omaĝon per interpretado de sia repertuaro.

Je la fino de la solenaĵo kaj en apuda salono la familio disponigis abundan antaŭmanĝon al la ĉeestantoj.

Pli ol 70 grupaj kaj privataj gratulmesaĝoj alvenis el ĉiuj partoj de la mondo, interalie de la nova prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, d-ro Renato Corsetti. Aparte ni enlistigas ilin kaj aperigas la du poeziajn mesaĝojn ricevitajn de Gabriel Mora i Arana kaj Antonio Marco Botella.

Komuna bankedo en apuda restoracio metis finon al la feliĉa festo longe restonta en nia memoro. Cetere profesia vidfilmo filmita dum la festo helpos al tio.

(Raportis Luz Vázquez kaj Llibert Puig)





# NIA AGADO

## POEMSKIZO, OMAĜE AL SAMIDEANO SALVADOR GUMÀ OKAZE DE LIA CENTJARA NASKIĜDATREVENO

Aŭtuna sun' somera, jubilea;  
somera, laŭ fruktado plenmatura  
kaj kun vigleco laŭ promen' alea  
tra jar' post jar' kun horizont' senmura.

Nobleco, fideleco. Jes: sindona  
labor' konstanta sen sven' nek falo;  
modelo je konduto, jen plej bona,  
gembrila, laŭ smeralda idealo.

Event' ĝojiga kun invit' al kanto  
vivcela. Glor' kaj krono verde laŭra.  
Honoro pro aprec' al Esperanto.  
Ekzemplo por ni ĉiuj, verde daŭra.

Gratulojn plej elkorajn, al amiko!  
Lazur' de l' jaroj; riĉa vivopaĝo  
el humanec' elstara; brik' sur briko:  
majesta tur', kun pint' el aĝa saĝo:  
lumturo scintilanta. Jen omaĝo!

Gabriel Mora i Arana  
30an de septembro 2001

### Ricevitaj gratulmesaĝoj al s-ano Salvador Gumà

Universala Esperanto-Asocio, Hispana Esperanto-Federacio, Belga Esperanto-Federacio, Flandra Esperanto-Ligo, Pola Esperanto-Asocio, Majorka Esperantistaro, Valencia Esperanto-Federacio, Brusela Esperanto-Grupo – Belgio, Esperanto-Grupo Bilbao, Esperanto-Grupo Laro – Rusio, Esperanto-Grupo "La Verda Stelo", Genta Esperanto-Grupo – Flandrio, Madrida Esperanto-Liceo.

**Belgio** (Roland Rotsaert, Geert Dehoux, Germain Pirlot, Herman Deceuninck)

**Ĉeĥio** (Jiri Laube)

**Danlando** (Amir Hadziahmetovic)

**Flandrio** (Leo De Cooman, Dan Van Herpe, Àlex Humet)

**Francio** (Renato Guillaume, Henri Masson, Émile Mas, Daniel Perard)

**Germanio** (Hans Jaeger, Horst Vogt)

**Hispanio** (Darío Rodríguez, Antonio Rey, Antonio Alonso, Rafaela Urueña, Luis Hernández, Manuel Pancorbo, Ricardo Carrillo)

**Hungario** (Otto Haszpra)

**Italio** (Pastro Magnani)

**Katalunio** (Manuel Casanoves, Josep Ferrer i Manyà, familio Molera, Josep Carnicer)

**Malto** (Carmel Mallia)

**Nederlando** (Wim Jansen, Gerrit Berveling)

**Slovakio** (M. Feificova)

**Tajvano** (Reza Kheir-Khak)

**Ukrainio** (Mikaelo Lineckij)

**Usono** (Dori Vallon, Óscar Otero, Karlo Freeman, Don Harlow)

## ROMANCO AL MIA AMIKO SALVADOR GUMÀ

Vi, amik' Gumà, centjara,  
mi salutas vin jubila!  
Kunlaboris ni milfoje  
ekde tiu tag' feliĉa  
kiam en Terrassa ĝoje  
amikiĝis ni por ĉiam  
dum kongreso, karmemore,  
la unua postmilita.

Vi posedas grandan lerton  
kiun tiom mi admiras,  
mi ricevis vian helpon  
en beletr' kaj kre-poezia.  
Homo kiu amas belon  
nur belecon disvastigas,  
vi disdonis kun talento  
tiun saĝon ermocian.

Ke la dioj vin gardu,  
vian sanon dum jarmilo;  
ke ili vin akompanu  
kaj donu al vi feliĉon!

Antonio Marco Botella  
Zaragoza, 2001



## RAPORTO PRI LA 30a KATALUNA KAJ 3a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

Kun 106 aliĝintoj (inter ili 27 eksterlandanoj el Britio, Francio, Italio, Nederlando kaj Pollando) la Kongreso okazis dum la tagoj 12, 13 kaj 14 de oktobro 2001 en la bela urbo Ĝirono, kie la urbestro disponigis al ni bone ekipitan kongresejon en la Kultura Centro "La Mercè".

La solenan inaŭguron prezidis la vicurbestro s-ro Joan Pluma. Post intervenoj de la loka delegito Arnald Massanes kaj de la prezidantino de KEA Neus Moly, enkondukis la kongrestemon Jordi Armadans, direktoro de la neregistara organizo Fondaĵo por la Paco.

Pri la kongrestemo "Migrado kaj lingvoj" prelegis István Ertl, Yenovk Lazian kaj Rubén Fernández kaj dum la Literatura Mateno la Esperanto-poeto Kris Long (lian prelegon ni aperigas aparte en tiu ĉi sama revuo).

En la Artaj Vesperoj partoprenis Georgo Handzlik – "la bardo sen barbo" –, sep-homa teatra trupo el Tuluzo sub la gvido de Arno Lagrange kaj Flavie Audibert, kiu dancis kaj mimis. Antaŭvidita en la programo estis la kantisto Jomo por prezenti sian lastan K-diskon *Jomo friponas*, sed lastmomente li rezignis partopreni. Li friponis nin, supozeble laŭ la influo de sia nova disko.

Kompletigis la programon ateliero pri tradiciaj dancoj gvidata de Mon Cardona, bunta kaj abunda libro-prezentado, libera forumo, transpirenea kunveno, sinprezento de la humana organizo Espero, fare de Óscar Puig kaj Éric Colignon, kaj traŭba vizito gvidata de profesia ĉiĉeronino kun traduko al Esperanto de Hektor Alos. (vidu kovrilan foton)

Dum la konkluda debato pri la kongrestemo, la Kongreso akceptis la rezolucion, kiun ni aparte aperigas.

Oni decidis kongresi venontjare en Sóller (Majorko) okaze de la 75-jara datreveno de la antaŭa kongreso okazinta tie en la jaro 1927 (informas Xavier Margais: [margabe@teleline.es](mailto:margabe@teleline.es)).

### KONGRESA REZOLUCIO

La partoprenantoj en la 30a Kataluna kaj 3a Transpirenea Kongreso de Esperanto, pritraktinte la temon "migrado kaj lingvoj", deklaras sian pretecon kunlabori kun neregistaraj organizoj aŭ aliaj instancoj interesiĝantaj pri la temo kaj pretas informi ilin pri siaj rektaj spertoj ĉi-terene, estante parolantoj de internacia neŭtrala lingvo kiel Esperanto, funkcia en la praktiko jam de pli ol unu jarcento en ĉiuj partoj de la mondo.

### GASTO RAPORTAS

Vi volas vere ekkoni Ĝironon, ĉu ne? Alvenu nepre frumatene, kiam la unuaj sunradioj kolorigas la ĉielon komence helverde, poste flavete kaj fine sen ioma hezito dispendigas ruĝajn bendojn laŭlarĝe de la jam oranĝa mondotegmento. Mi certas, ke la flago kataluna estis kreita frumatene.

Apud la mezepoka urbomuro staras arbego centjara. Kiom ajn fruas la horo, la feste vestitaj pigoj jam komencis sian surarban kongreson kaj vigle priparolas ion en sia internacia piga lingvo.

Tamen temas pri alia kongreso, kien oni min invitis prelegele. Tio estis la unua kongreso miavive, mia unua renkontiĝo kun tiom da esperantistoj, mia unua vizito en Katalunujo... Mi ne sukcesas disigi miajn esperantistajn impresojn disde tiuj pri la lando. Jen kelkaj linioj el mia poŝkajereto:

- Laŭproverbe, tempo estas mono. Ĝuste tial pri la tagordo respondecas la kasisto s-ro Llibert Puig. "Homoj, –aŭdiĝas lia voĉo– ek en la kongresejon!" Neniu rapidas, sed neniu malfruas: ĉe la katalunoj ĉio okazas ĝustatempe.
- El inter la lokaj esperantistoj mi renkontis eĉ ne unu "eternan komencanton": ĉies Esperanto estis bonega.
- Katalunio estas mondereto amegata de siaj landanoj. Ĉi tiaj landoj feliĉas kaj prosperas.
- La kongreso estas ne nur tio, kio okazas en la kongresejo. Ĝi daŭras longe post noktomezo, ĉirkaŭ la glaso aŭ taso da io, sed ofte eĉ sen tio.
- La datrevena gratulo ĉe katalunoj estas "Per molts anys!". La armenoj bondeziras laŭvorte la samon. Jen kiel Esperanto helpas malkovri similaĵojn inter malproksime nestantaj popoloj.
- Mi havas delongajn koreajn amikojn. La prelego de Rubén Fernández helpis al mi ekkoni ilin pliege profunde.
- Antaŭ la kongreso mi senkviete pripensis la lingvan edukon de mia fileto: ĉu li parolos egalflue la gepatran lingvon kaj tiun de la lando? Dum la kongreso mia timzorgo malaperis: jen la gefiloj de István Ertl libere naĝas en kvar lingvoj.

Transpirenee via, Yenovk Lazian



# NIA AGADO

## TRI POETOJ KAJ UNU VORTO

Temas pri tradukproblemoj.

La tri poetoj estas George MacKay Brown, kiu vivis la tutan vivon sur orkada insulo (norde de Skotlando), T. S. Eliot, usonano kiu ŝanĝis sin en anglon, kaj Basil Bunting, nordanglo profunde trempita en persa kulturo kaj vivo.

La vorto, kiu foje ŝajnas grave manki al angloj, estas, laŭ neologismo proponita de L. N. M. Newell, 'paterno'.

Brown verkis pri orkada vivo, do bezonis vortojn (jam en PIV, sed eble malofte uzitaj) kiel eglefino aŭ hubulo. Pri tia vivo dum jarmiloj, el epokoj de ŝtonrondoj, ĝis vikingoj – kaj li diras ĉiam elon anstataŭ biero.

Laŭ PIV elo estas "speco de angla biero". Sed kia speco? Kiel do neangloj uzu la vorton? Angloj fakte ne distingas klare; sed fakuloj foje diras 'elon' pri biero sen lupolo, antaŭ la 16a jarcento – do jen taŭge antikva vorto.

Brown foje uzas unu vorton en diversaj signifoj en la sama poemo, ekzemple vorton parenca al nia 'faldi' kun gamo de signifoj tamen pli proksima al 'volvi' – kun ŝirma sugesto. Sed kia poemo rezultas? Rekoneblaj signifoj de angla vorto, nur eblaj signifoj de nia... Ĉu falsa traduko? Sed centra kaj esenca poemo en lia verkaro! Ĉar tia estas la mondo: siaspeca 'paterno'...

Newell proponis la vorton por traduki Burnt Norton, unua Kvarteto de Eliot, en frua *Fonto*. Mi tradukis ĉiujn kvar – kaj trovis ĝin ne tiel nepre: eble sufiĉas 'figuro' kiel en parol- aŭ stil-figuro. Sed restas juka sento, ke sen ĝi koncepto mankas, eĉ se tre nebula (ĉu 'strukturo' efikus simile al ekz. Franco?).

Kritiko nun pli alte taksas fruajn poemojn de Eliot. Sed ili prezentas multe pli tiklajn problemojn. Du ŝajne kontraŭjudaj versoj ĝenas. Ezra Pound estis klare kontraŭjuda, sed iel restas granda post

forstreko de tiaj pecoj. Dum forstreki ion el unu poemo de Eliot riskas fuŝi la tutan verkaron. Do se ni volas havi tiun gravan poeton en Esperanto, necesas fronti la problemon!

Ĉiuj kvazaŭ kontraŭjudaj versoj de Eliot estas gramatike strangaj – kvazaŭ iu monologus, li nur raportas. Laŭ "oni" judoj havas monon, luas ĉambrojn ktp. (memoru la surprizan titolon "Judoj sen Mono"). Do – ruza solvo. 'Monisto' havas filozofian difinon en PIV, sed unuavide (ĉu ne?) zorgas pri mono (teisto, monoteisto – analizu mem!). 'Monisto' anstataŭ 'judo' evitas tujan antaŭjuĝon de leganto, postulas cerbumon...

Bunting, junaĝa disĉiplo de Pound, malkonsentis politike: kvakero, militrifuzanto, pli "nia homo". Briggflatts estas "sonato" verkita kontraŭ la muzikaj kaj religiaj pretendoj de Eliot, nordangla poemo pri ŝafpaŝtaj deklivoj ktp. La norda vorto por deklivo aŭ monteto eĉ havas arkaikan kromsignifon, samsonan 'felo'... Angloj *rulas bulojn* sur herbo en ludo parenca al suda 'petanko' (neologismo?): *lignajn* bulojn, ne perfekte globajn, sed oblikvajn, kies vojo des pli kurbas ju pli malrapida. Tio kreas strategiajn ludeblecojn – krom bildo por poemo, precipe se la ligno estas pomarba... Sed (plua tubero) sudangloj rulas bulojn sur *ebena* herbo, nordangloj tradicie sur *konvekso* herbejo – pli komplikaj kalkuloj! Kaj parto de la "paterno" kiun la poemo kreas...

Konsterna parto de Briggflatts temas pri grimpo tra fekojn: "mevpavimon" sur marklifo, sed ankaŭ tiujn de la "kloaka" gazetaro (Bunting estis ĵurnalisto – antaŭ kaj post diplomata kariero en Persio). Sed "tritik' el fekoj kreskas", tra tritikajn tigojn glitas *l'angviso*, senkrura lacerto, la vera (humila) heroo de la poemo, kiu vekas la falsan heroon Aleksandron Makedonan (el poemo de Firdouŝi) post falo de sur la pinto atingita post la mevpavima klifo...



'Angvison' vi verŝajne serĉos en vortaro; angle oni aŭdas "malrapidan vermon", sed angvisio ne estas vermo, povas fulmorapide forgliti... PIV proponas ankaŭ "vitroserpenton": eble tro da silaboj por poemtraduko, sed alie pli bone.

Kurbaj vojoj, serpentaj vojoj... Kiel komencliteroj en la Lindisfarn-evangelioj, nordangla manuskripto en kelta stilo. Jen plia tubero. Bunting priskribas ĉasantojn – kaj poste asketojn. Por li (kaj multaj tuj post milito) malgranda paŝo ĉu? Sed

nunaj angloj (longe for de terkulturo kaj militoj) trovas ĉasadon barbara – kaj sentimentalas pri kelta kristanismo, ne vidante la severe asketan flankon (kiun montras ekzemple skriboj de Kolombano en la 7a jarcento...) – ĉu Esperantolegantoj malpli antaŭjuĝos?

Jen lasta bildo pri 'paterno': impliko, teksita teksto el figuroj kaj kurbaj linioj en arto de venkita kulturo...

Kris Long



## SABADELL

En *La Gaseto* de la lasta oktobra semajno, suplemento de la loka ĵurnalo *Diari de Sabadell*, aperis tripaĝa intervjuo kun pluraj fotoj al Llibert Puig, prezidanto de la loka Centro de Esperanto Sabadell.

Ĉi-jare denove CES organizis la tradician kaŝtanfeston en sia sidejo kun partopreno de entute 20 geesperantistoj.

Survoje al la ĉi-jara Kataluna Kongreso, István Ertl, redaktoro de la revuo de UEA, gastis en nia urbo kaj vizitis la sidejon de CES.

## TARRAGONA

La tieaj samideanoj informas:

Ke dum la nuna jaro ne okazos kurso.

Ke ili ĉiumonate renkontiĝas la unuan kaj trian mardon ĉe la trinkejo *La Cantonada*, str. Reding, Tarragona.

Ili estas kontakteblaj ankaŭ ĉe la retadreso: [esperanto@tarragona.mailbox.as](mailto:esperanto@tarragona.mailbox.as)

aŭ telefone al Joan Marimon 977-243709 kaj Ferràn Marín 977-520024.

Ili ankaŭ posedas la TTT-ejon [www.cet.miarroba.com](http://www.cet.miarroba.com) aŭ [www.webcindario/cet/index.htm](http://www.webcindario/cet/index.htm)

**(Verŝajne niaj ceteraj Grupoj ankaŭ aktivis, sed nia redakcio ne ricevis informojn. Bonvolu tion fari tuj post fino de la aranĝo)**



# INTERNACIE

## INTERNACIA FOTOKONKURSO

La konkurso ne estas ligita al deviga temo. Rajtas partopreni ĉiu deziranta fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj en minimuma formato 10 x 15 cm. koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Ne estas akceptataj tamen fotoj senditaj komputil-rete.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti enmetita slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga.

En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

Tripersona juĝkomisiono aljuĝos premiojn.

1a premio: du minimumaj ruslandaj monataj salajroj kaj abono al "La Ondo de Esperanto"

2a premio: unu minimuma ruslanda monata salajro kaj abono al "La Ondo de Esperanto"

3a premio: abono al "La Ondo de Esperanto"

Specialan premion (libroj de "Sezonoj" kontraŭ ekvivalento de unu minimuma ruslanda salajro) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2003 aperigi la ricevitajn fotojn en paperaj kaj elektronikaj eldonaĵoj kaj en ekspozicioj.

La konkursajn fotojn bonvolu sendi unuekzemplere al "La Ondo de Esperanto" ab.ja.1248 KALININGRAD (RU-236039). La fotoj devos atingi la indikitan adreson antaŭ la 15a de decembro 2001.

## NEPALA RENKONTIĜO

La 4a Internacia Himalaja Renkontiĝo okazos inter la 26a de februaro kaj 8a de marto 2002 (aliĝilo havebla ĉe nia asocio)

## INTERNACIA FESTIVALO

La 18-a Internacia Festivalo okazos en Magdeburg (Germanio) inter la 27-a de decembro 2001 ĝis la 3-a de januaro 2002. Ĝi ofertas al vi specifan programon por mezaĝuloj ("dua generacio") kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj. IF okazas sub profesinivela gvido kaj kunvenigas ĉiujare ĉ.200 personojn. La klerigejo ("Jugendgästehaus") estas modernigita kaj komforta junulara hotelo meze en la urba centro, tamen en sentrafika ĉirkaŭo. Je dispono estas diversgrandaj ĉambroj. Ĉiuj urbaj vidindaĵoj kaj butikuma centro proksimas. (Laŭdezire transporta servo de stacidomo). (aliĝilo havebla ĉe nia asocio)

## INTERNACIA E-KONFERENCO 2002 (SCIENCO KAJ SOCIO)

Organizita de Organiza Societo de Internaciaj E-Konferencoj kune kun la Lovena Universitato, Internacia Esperanto-Konferenco okazos en Leuven (Belgio) de la 20a ĝis la 26a de julio 2002.

La tema programo (inter la 9a kaj 13a horoj) esploros rilaton inter Scienco kaj Socio. La posttagmeza turismado samtempe kondukos al interalie mikro-elektronika centro, beginejo, kastelo kaj muzeoj pri Mez-Afriko kaj Natursciencoj.

Informojn kaj aliĝilon vi tuj petu de : [esperanto3000@esperanto.be](mailto:esperanto3000@esperanto.be) aŭ de : Esperanto 3000-R.Ménada,44-BE-1320 HAMME-MILLE (Belgio)